**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2008**

**EKSPOZICIO DE E-LIBROJ** 11-an de februaro ĝis la 8-an de marto
**Centro Comercial Gran Vía de Hortaleza**
MADRID- Metroo "Mar de Cristal"
En la stando deĵoras ĉefe membroj de MEL kiuj ankaŭ prizorgis gazetaran servon.

## ESPERANTA MONDO

La Esperanta PEN-Centro (asocio pri e-ĵurnalistoj) ricevis formalan informleteron de la Sveda Akademio por proponi kandidaton al la Literatura Nobel Premio. Ili proponis al Marjorie Boulton. Ŝi estis elektita por la legantoj de Literatura Foiro inter 4 kandidatoj, ĉiuj famaj e-verkistoj.

Ankaŭ UEA estis proponita por la Nobel Premio pri Paco. Post svisaj parlamentanoj, britaj intelektuloj decidis subteni ĝin.

La Centro de Komunumaj Aferoj de Volta Redonda ( Brazilo) organizis e-kurson por emeritoj ĉar oni konsideras ke lernado de Esperanto estas valora okupa terapio, kiu helpas krei memestimon, stimulas memoron, pligrandigas memfidon kaj ebligas amikecon kaj fratecon inter la gelernantoj de ĉiuj aĝoj.

## EN HISPANIO

En februaro okazis en madrida trinkejo la premiera prezento de **mallonga filmo** (vere mallonga, ĝi daŭras 2 aŭ 3 minutojn), kiu enhavas kelkajn frazojn en Esperanto kaj rekte rekomendas ĉi tiun lingvon. La titolo estas "Mondo", la reĝisoro Enrique ANDRÉS. Manolo Parra, nome de HEF, lingve helpis.

En la reta versio de la ĵurnalo "Público" aperas la artikolo: "Enterrados con su lengua" con aldona komento de Jorge Camacho.

http://www.publico.es/ciencias/043181/lenguas/moribundas/filologia

ABC 2008-01-25 Paĝo 3 "La democracia es el esperanto de la era posmoderna"- Benigno Pendás. Profesor de Historia de las Ideas Políticas

Laŭ "Ciberp@aís" (eldonita kune kun ĵurnalo "El País") de 2008-01-31 la interreta portalo Facebook pretigas sian hispanan version sed ne nur tio, la retpaĝo havas wiki-n (paĝo per kiu la uzantoj eblas skribi artikolojn kaj publikigi ilin) por traduki la portalon al iu ajn lingvo.

La libro "Eklipsas" de Jorge Camacho estas unu el la kandidatoj por la PEN-premio "La verko de la Jaro-2007".

Jorge Camacho skribis recenzon de la dulingva libro "Don Quijote habla esperanto", la verko eldonita de HEF dum la jaro de la centjariĝo de "El Quijote" kaj subvenciita de la Ministerio pri Kulturo. Laŭ la titolo "librero pri librego" ĝi aperis en la Nº-2 (marto 2008) de la revuo "Beletra Almanako"
http://www.librejo.com/beletra-almanako/ba2/beletra-almanako-ba-2.html

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIGXOJ

**14-16 marto IBERIA RENKONTIĜO 2008**
Benicàssìm
http://www.esperanto.cat/ir2008/
Organizas junaj iberiaj esperantistoj

01-08 marto Mediteranea esperanto-semajno. Saint Raphael, Francio. prezmoni@hotmail.com
03-06 julio.67-a Hispana Kongreso de Esperanto. Cuenca . alejandro.pareja@gmail.com
16-26 julio 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Roterdamo (Nederlando)
26 julio- 1 aŭgusto. Internacia Junulara Kongreso (TEJO) Szombathely (Hungario)

## HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariejo de HEF funkcias en Rodríguez San Pedro 13 lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

Universala Esperanto-Asocio akceptis kiel nova delegito kaj faka delegito por Hispanio al

Enrique Navarro Rubio el Zaragozo

**Kupono de ONCE pri Zamenhof aperos la sabaton 17-an de majo 2008**. Grava sukceso dank'al Pedro Zurita kiu parolis kun respondeculo de Once kaj ili rekonsideris la peton kiu estis neita.

En la Eksterordinara Kunsido de HEF (2008-02-25) oni aprobis la kontojn 2007. Ankaŭ oni aprobis subvencion je 150€ al Iberia Renkontiĝo okazonta en marto en Benicàssìm.

La Estraro akceptis al **Raúl Martínez kiel nova librotenisto** de HEF. Dum la venonta Ĝenerala Kunsido en Cuenca la membraro devas ratifi lin kiel nova estrarano. Li anstataŭas al Pedro Garrote kiu demisiis je la fino de la jaro post 12 jaroj kiel librotenisto.

**Hispana Esperanto-Kongreso 2008.** Cuenca 3a ĝis la 6a de julio. Kongresejo: Centro Cultural "Escuelas Aguirre". Loĝejo: Universitata Restadejo "Residencia Universitaria Bartolomé Cossío" (15 min piede de la kongresejo). Grandegan oferton por la loĝado kaj manĝado po 80€ tri tagojn. Pli da informoj: http://hispanakongreso.notlong.com kaj www.esperanto.es (esperanta versio-kongreso)

**MODIFOJ EN BUĜETO 2008 DE MEL**

Madrida Esperanto-Liceo, kiel asocio de municipa publika utileco, ĉi-jare petis du subvenciojn al la Madrida Urbodomo: ŝranko por sia biblioteko (la libroj estas ĉe HEF) kaj por partopreno en la Hispana Esperanto Kongreso. Pro tio ĝi devis ŝanĝi sian buĝeton 2008 kiu aperis en Nia Voĉo decembro: TOTALO 3.400 eŭroj. Modifoj en elspezoj : Armario-Biblioteca: 1.500, Asistencia a Congreso Cuenca 900,00. Modifoj en enspezoj: Subvenciones: 2.400 eŭroj

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

La konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79.

KURSOJ:

**Vallecas**. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951

PRELEGOJ:

10-an de marto, lundo je la 18,30 "Sirio kaj Jordanio", en la sidejo de HEF.

17-an aprilo, jaŭdo je la 18,30. Casa de Guadalajara, Plaza Santa Ana 15. "El esperanto en el año internacional de las lenguas" Toño del Barrio.

## La kotizo de MEL por la jaro 2008 estas 12,00 eŭroj

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid,

Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid